Universala Esperanto-Asocio

**Nordafriko vokas!**

Estrara Subteamo: MOVADO

*EKO 2015-10*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

Sendita el Hamameto la 30an de marto, 2015

## *Oka Mezorienta Kunveno – multkontakta kun urbanoj*

El la ok ĝis nun okazigitaj Mezorientaj Kunvenoj (MK), tiu nun disvolviĝanta en Tunizio estas la plej granda kaj plej multnacia. Tiuj kunvenoj apartenas al la regiono en UEA nun nomata MONA – Mez-Oriento kaj Norda Afriko. Tiu rekorda MK, okazigita en la pitoreska apudmara urbo Hamameto, aŭguras spuretojn pri progreso kaj potencialo en la regiono.

La aranĝo arigis 71 aliĝintojn, sed pro lastaj eventoj, la alvenintoj nombris ĉ. 45. Unu tuta grupo estis malhelpata alveni pro nuligitaj flugoj. Tamen, la naciecoj ege buntas: Laŭ loĝlandoj: Alĝerio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Maroko, Nederlando, Rusio, Svislando, Tunizio kaj Turkio, Se enkalkuli naskiĝlandojn, aldonu Kubon, Nov-Zelandon kaj Pollandon.



Komence de la malfermo la ĉeforganizanto, s-ino Dorota Parzyszek, donis programajn, ejajn kaj praktikajn informojn. Sekvis interkona horo, laŭ iom tro ŝablona formulo, sinprezentoj diverslongaj laŭvice en rondo. Vespere, la kolektivo promenis kune al la fortikaĵo kaj malnova urbo por kune kun urbanoj festi la mondan kampanjon'Horo por la Tero' – dum tiu horo la plimulto de la urban lumoj estis estingitaj.



La postan matenon ni dediĉis al vizito tagluma al tiu urbomezo, organizita kunlabore kun la tunizia asocio por la protekto de la medino (malnova urbo). Post akcepto en fama kafejo, manko de perdiĝo en la medino – nur pro la gvidado – la esperantistoj estis gastoj, kune kun pli granda nombro da urbanoj, en la sidejo de tiu protekta asocio; tie videblis foto- kaj pentraĵ-ekspozicioj kaj ampleksa bunte ekspo-nita manĝo – plena je hejmfaritaj pladoj, tipaj ekzemple por geedziĝfestoj, do ne tiuj, kiujn spertas simplaj turistoj en hoteloj.

La tuta mateno donis abundajn eblojn prezenti nin kaj nian lingvon al la urbanoj kaj aliaj vizitantoj – nia medina vizito okazis kune kun juna grupo de studentaĝaj urbanoj, kiuj spontane distris sin – kaj regalis nin – per aŭtentikaj kantoj, ĉantoj, malfrapado kaj ululado.



Posttagmeze, malfermis la prelegan sesion Aleksandr Melnikov, kiu prezentis la vastajn eblojn por vortŝerci en Esperanto. Paralele okazis en koridora rondo tre vigla paroliga kurso sub gvido de Rafael Mateos González, hispan-devena sed plurmondangula loĝanto kaj vaganta instruisto. Li sukcesis bone aktivigi la rondon de ĉ. 20 personoj, spite ilian tre varian nivelon de lingvo-scio. La dua prezentaĵo konigis la novan programon de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO), laŭ lumbildoj, kiuj sumigis la programon tra 2014. Sekvis diskuto pri AMO, kiu tamen transiris al bonnivela diskutado pri plej diversaj aspektoj de la movada nuntempo – la bezono por rejunigo, la transformo de nia taskaro pro la retepoko, la rolo de UEA en movada evoluigo, la ebloj starigi projektojn kun celoj pli vastaj ol nur Esperanto (ekzemple interkulturaj studoj kaj vizitoj) por kiuj eblas altiri eksterajn rimedojn.

Pli da informoj pri Tunizio kaj la 8a MK estas troveblaj ĉe:
https://www.facebook.com/pages/Bonvenon-en-Tunizio/1440899129512807

Partoprenantoj estas invititaj meti siajn fotojn ĉe:
https://www.facebook.com/events/1422908351332054/





La kunveno daŭros tra du pliaj tagoj kaj finiĝos merkrede, la unuan de aprilo, kun turismocela ‘postkongreso’. Nova mondparto por multnacia kunvenado – malfermo al nova ekstero – alia ol tiu, kiun ni kutime konas.

Teksto aprobita de la organizintoj.